

---

---

# ESPERANTO EN AFRIKO

*Bulteno de la Afrika Komisiono de UEA*

Numero 04

Decembro 2007

---

---

*Karaj legantoj,*

*Baldaŭ post la lasta numero aperas nova numero de nia bulteno. Novajoj en la afrika Esperantujo abundas. Bonvolu daŭre informi la Afrikan Oficejon de UEA pri la movado en via lando.*

*La Redaktantaro*

\*\*

Ni represas la alvokon el la antaŭa numero, ĉar ĝi daŭre aktualas.

## ALVOKO AL NIAJ NEAFRIKAJ AMIKOJ OKAZE DE LA UNIVERSALA KONGRESO EN 2008 EN ROTERDAMO, PERIFERIA URBO DE AFRIKO



Neniu afrikano partoprenis la ĉi-jaran UK en Japanujo. La malproksimeco inter Afriko kaj Japanujo kaj la alteco de la flug-kostoj, kiuj kutime devis antaŭvidi transiron de unu aviadilo en la alian en Eŭropo, malkonsilis elspezi tiom da mono ĉi-jare. Tamen en la venonta Universala Kongreso povos partopreni kelkaj afrikanoj koste de la Triamonda Kongresa Fondaĵo.

Roterdamo ja ne estas tiel malproksima de Afriko, kaj oni povas konsideri ĝin preskaŭ periferia urbo de nia kontinento.

Tamen por ke la partopreno realiĝu la amikoj de Afriko kaj de afrikaj esperantistoj devos malavare kontribui al tiu Fondaĵo, kies rimedoj hodiaŭ ne permesas la vojaĝon al multaj afrikaj esperantistoj, kiuj ja meritas partopreni.

La pagmanieroj estas la kutimaj pagmanieroj al UEA indikitaj en Jarlibro 2007, p. 36. Bv. aldoni la indikon “Por afrikanoj al UK”.

*Ni estas tre dankaj al vi, se vi ebligas al ni partopreni kaj sperti la UK-etoson kaj al la ceteraj kongresanoj havi kontakton kun la afrika movado, kiu kreskas kaj solidiĝas.*

## RAPORTO DE LA NOVA MEMBRO DE LA KONSILANTARO DE LA AFRIKA KOMISIONO GERHARD HIRSCHMANN

Karaj afrikaj geamikoj,

Mi tre ĝojas pri la ĉijaraj impulsoj, puŝoj por la evoluigo de nia mondcivitana movado, Esperanto-fako.

Dum aŭgusto mi vizitis okcidentan Afrikon, Beninon ĉefe sed ankaŭ Ganaon, trapasis Togolandon kaj estis “preskaŭ” en Niĝerio, sed la limgardistoj ne permesis mian eniron, domaĝe! Tamen la renkontiĝo ĉe la landlimo kun Seraphim Monday Anagovi, nia direktoro por Niĝerio, estis unuanime frata. Spite al kelkaj provoj atingi la vizon, ankaŭ dum plua tago en ambasadejo en Cotonou, bedaŭrinde mi ne sukcesis, kaj la atendantaj seminarianoj vane atendis min. Sed telefona kontakto al ili sukcesis.

Mi sentis min en granda familio de esperantistoj kaj mondcivitanoj, kaj en la urboj Lokossa, Cotonou, kaj rifuĝejo de togolandanoj Codji, ĉiuj en Benino, kaj en Akro kaj en Akim-Oda, ambaŭ en Ganao. La kunlaborantaj amikoj F. Hounsounou, Alfred Arthur, Paul Mensah, oficisto de la Afrika Oficejo de UEA Francis-K. Agbenou, J. C. Alofa kaj multaj aliaj preparis kaj organizis la renkontiĝojn, prelegojn kaj seminariojn, kaj akompanis min dume.

Manon en mano la mondcivitanoj kaj/aŭ samtempe esperantistoj kontribuis al la sukceso.

Raportoj pri la plej gravaj eventoj jam estas faritaj, kelkaj ankoraŭ atendas mian ellaboradon. Proponoj kaj petoj por subteni konkretajn projektojn jam estas transdonitaj.

Ebligis mian partoprenon germana studvojaĝo oktobre ĉi-jare al Mozambiko kaj Svizlando. Preskaŭ tri semajnojn ni agadis sur kelkaj kampoj, ekz.:

- kontaktoj kun junulara organizaĵo, kies respondeculoj esprimis grandan intereson pri Esperanto, kaj kun kiu kunlabora kontrakto estas nun ellaborata;
- konsultaj kontaktoj kun sociaj organizaĵoj (por klerigado, instruado, informa agado kontraŭ HIV/aidoso, kaj liverado de interesaj okup-ebloj al la junularo) en diversaj urboj;
- personaj kontaktoj kun aktivuloj de projektoj por prizorgi orfojn kiuj perdis la gepatrojn pro aidoso kaj nun havas adoptan familion, ktp.

Dankon al ĉiuj kunagantoj, al la Centra Oficejo de UEA, kaj al la membroj de la Afrika Komisiono de UEA. Sen ili la sukceso ne eblus.

*Gerhard Hirschmann*

# PASINTAJ AGADOJ EN AFRIKO

## RAPORTO PRI KUNVENO DE LA ESTRARO DE LA LANDA ASOCIO EN BENINO

Karlo Alofa el Cotonou kun gasto el Kongo (Kinŝaso), nome N'landu – Nialukulu, Rikardo, esperantisto el la klubo Verda Stelo, Latifou Gbadamassi (prezidanto de la landa asocio), Pierre Houenavo (Esperanto-instruisto en Kodji, kasisto de la landa asocio), Francis Agbenou Kodjovi (oficisto de UEA/AO, prezidanto de la klubo Verda Familio en la rifuĝejo Agame), François Hounsounou (prezidanto de la klubo Pacaj Metiistoj en Lokossa, respondeculo pri la ILEI-sekcio en Benino), André Gokan (ĝenerala sekretario de BOJE), Sonadé Kakpo (organizanto de BOJE), Amegnihoue Gokan (kasistino de BOJE), kaj ceteraj ĉefaj respondeculoj de kluboj partoprenis la kunvenon.

La kunveno estis malfermita per la voĉo de sinjoro Gbadamassi. Jen la tagordo:

1. disdono de subvencio al aktivaj kluboj (100 eŭroj) sendita de UEA;
2. laboroj antaŭvidataj pro la ILEI-konferenco en 2008 en Benino;
3. la evoluo pri la kurso *Gerda* en Benino;
4. ceteraĵoj.

Resume: La subvencio estas disdonitaj al la dek plej aktivaj kluboj.

Jen la kompleta listo de la kluboj:

1. Pacaj Metiistoj (Lokossa) de François Hounsounou;
2. Egaleco (Kodji) de Pierre Houenavo;
3. Nova Mondo (Sedje) de Honorine Azonhoutu;
4. EJEJA (Adohoun) de Jonas Hounkpe;
5. Rondo Familia (Lokossa) de Eugène Tchoume;
6. Monda Familio (Azove) de Appollinaire Sohounme;
7. Sankta Harmonio (Ayahohoue) de Latifou Gbadamassi;
8. Verda Familio (rifuĝejo Agame) de Francis Agbenou;
9. La Gefratoj de Zamenhof (Lokossa) de Felicien Yehouessi;
10. Arigbo-klubo (Glazoue) de Mechak Ezin.

Nun post tio okazas profunda interdiskuto pri la planata ILEI-konferenco en 2008.

Notindas jenaj punktoj: Ni organizu interrenkontiĝon (kongreseton) por diskonigi tiun gravan konferencon de 2008. Endas semi la ĉhon inter la kluboj pri la utileco de *Gerda*-kurso. Ni provu pli varbi aliajn lernantojn al la movado, enkonduki Esperanton en lernejojn kaj ĉe radiostacioj, okazigi ago-tagon por profiti la okazon disdoni flugfoliojn amase eĉ ĉe poŝtkestoj ĉe la poŝtoficjoj.

Rimarkoj: Pluraj interrenkontiĝoj permesos efikan antaŭlaboron pri la konferenco. Man-en-mane la benina landa asocio tutkune kun AO kaj benina ILEI-sekcio ŝatus dece interkunlabori por ne fiaske maltrafi tiun gravan eventon kiu neniam antaŭe okazis en Afriko.

Por havigi monon al la kaso de la landa asocio, membro-karto pri Esperanto estis farita kaj ĉiuj bonaj esperantistoj denaske beninanoj devas havigi al si tiun karton. Ĝi kostas mil kvin cent CFA.

La benina landa asocio ricevis kiel subvencion tri cent eŭrojn, cent por la subvencioj de la lokaj kluboj kaj ducent por la landa agado.

Neaktivaj kluboj:

1. Solidareco (Lokossa) de Ferdinand Awoudjenou;
2. Nigra Stelo (Cotonou) de Gildas Zougnon;
3. Verda Stelo (Cotonou) de Edouard Dossou;
4. Geamikoj... (Cotonou) de Maurice Hounto;
5. Klubo de Aguidahoue (Aguidahoue) de Robert Ayadji;
6. Verda Stelo (Aplahoue) de Edgard Dokui;
7. Verda Flamo (Aplahoue) de Benoit Zinkpe;
8. Nova Generacio de Esperanto (Cotonou) de Clement Gbozo.

Ekzistas kelkaj lernejoj en kiu Esperanto estas enkondukita. Ili estas: baza lernejo Jules Verstraeten en Kodji, La Fontaine de Vie, La Relève en Adohoun, kaj la klubo Sukceso de Kpadehoue Ouedeme. Ili ne ricevis subvencion.

*Raportis Agbenou Kodjovi Francis kaj Pierre Houenavo*

\*\*\*

## AGADO PER ESPERANTO KAJ SPORTO EN RUMONGO, BURUNDIO

La hodiaŭa raporto koncernas agadojn en Rumonge. Informojn pri aliregionaj agadoj mi disponigos en la venonta numero. En ĉi-regiono, Esperanto estas forta kaj tieaj esperantistoj laboras senlace por progresigi la movadon.

Kluboj en Rumonge aktivas. Eĉ nokte, homoj kiuj ne havas tempon tage, renkontiĝas por lerni Esperanton. Instruistoj kaj lernantoj jam al-kutimiĝis al tia horaro. Ni kelkfoje enkondukas kursojn en hejmoj, kaj tio estas tre bona metodo ĉar dum tiaj kursoj ĉiuj hejmanoj partoprenas la kurson, kaj ili rapide komprenas kaj progresas ĉar post la kurshoro, ili mem kunparolas kaj praktikas. Oni enkondukas kurson en pluraj liceoj, organizas konkursojn kaj prelegojn en diversaj lokoj de Rumonge kaj la rezultoj estas tre bonaj ĉar tio vidiĝas en la altiĝo de nombro pri novaj lernantoj. La plej aktivaj liceoj estas



Lycée de Rumonge (kie ĉirkaŭ 125 lernantoj sekvas kurson kunordigatan de Gilbert Niyukuri en la klubo 'Elefanto'), Lycée du Carmel, Lycée Islamique kaj Lycée d' Iteba. Instruistoj sin ofertas por altiĝi la nombron de lernantojn kaj por doni bonan konon al la novaj. La instruistoj renkontiĝas ĉiusabate por lerni kaj legi librojn aŭ preparoli iun temon. Tiuj ĉi interparoloj kaj kursoj helpas al junaj instruistoj plibonigi la scipovon kaj spertigas ilin.

La piedpilka teamo en Rumonge: ESPERANTO FC. Unua de dekstre: Venant Hakizimana.

En Rumonge oni starigis esperantistan teamon por konigi Esperanton en sportaj medioj. La celo de la teamo estas informadi per sporto, kaj ĝin gvidas Venant Hakizimana. Nia celo estas informadi per sporto kaj, laŭ mi, ni jam atingis ĉi-celon ĉar nun ĉiuj piedpilk-ŝatantoj konas Esperanton kaj aliaj eklernis ĝin. Dankon al membroj de MELS, kiuj jam helpis nin; ni invitas

ĉiujn homojn helpi nian teamon sendante futbalaĵojn (eĉ malnovaj povas helpi nin). La teamo nun partoprenas lokan oficialan ligon, kaj ni esperas ke en venontaj jaroj ni fariĝos ĉampiona. Multe helpos via subteno. Ni planas starigi alisportajn teamojn en venontaj jaroj.

Vidiĝas ke homoj interesiĝas pri Esperanto, kaj ni ne havas sufiĉe da libroj en nia stoko. Pro tio ni petas al vi ĉiuj kiuj legas ĉi-revueton, helpi nin sendante librojn kaj aliajn instruilojn al: SABUYUMVA Jérémie, BP 170 Rumonge, Burundio; <jerrybs21@yahoo.fr>.

*Jérémie Sabiyumva*

## **Intervjuo kun la prezidanto de la sporta filio en Rumongo**

E.A: Saluton Venant Hakizimana! Vi estas prezidanto de la sporta filio en Burundio kaj prezidanto de la piedpilka teamo ESPERANTO FC. Ĉu vi povas diri al ni kial vi starigis ĉi filion?

H.V: Saluton! Dum la unua nacia kongreso (Rumonge 2005) naskiĝis ideo informadi per sporto, kaj en la fino de la kongreso okazis piedpilka ludo inter rumonganoj kaj eksterrumonganoj. Dum la ludo, multaj homoj venis rigardi kaj samtempe esperantistoj profitis por varbi homojn, kaj la rezulto estis tre bona. Post kontakto kun la prezidanto de MELS (Monda Esperanta Ligo por Sporto), ni starigis tiun ĉi filion. Ĝi kunlaboras kun la nacia asocio ANEB. Ni starigis la filion por ke Esperanto atingu sportajn mediojn, ĉar ankaŭ sportemuloj bezonas Esperanton.

E.A: Ĉu vi povas diri al ni la celon de via filio?

H.V: La celoj de nia filio estas unue informadi per sporto kaj due, kunigi ĉiujn sportemajn esperantistojn.

E.A: Jam unu jaro pasis, ĉu vi jam atingis vian celon?

H.V: Ne komplete sed tamen, la rezulto estas bona. Nun en Rumonge, kie ni forte laboras, Esperanto estas konata de sportemuloj, precipe piedpilk-ŝatantoj pro la piedpilka teamo "ESPERANTO FC", kiu nun partoprenas en loka piedpilka turniro. Tio estas por mi grava atingo kaj mi kontentiĝas kiam ni starigos aliajn teamojn. Ne nur piedpilkŝatantoj bezonas Esperanton, ankaŭ alispecaj sportemuloj ĝin bezonas.

E.A: Kiajn problemojn vi havas en via agado?

H.V: Niaj problemoj estas financaj kaj materialaj. Multaj esperantistoj ankoraŭ ne komprenas ke sporto estas bona informilo, ĉar ĝi kunigas multajn homojn el diversaj regionoj kaj kulturoj. Pro tio, ni ne havas sufiĉan subtenon kaj tio estas por ni granda malhelpo.

E.A: Kiu financas viajn agadojn?

H.V: La filio estas ligita al MELS (Monda Esperanta Ligo por Sporto) kaj al ANEB (Nacia Asocio por Esperanto en Burundio). La filio ricevas financon helpon el ambaŭ organizaĵoj, sed vi scias ke MELS kaj ANEB estas novaj organizoj kaj ke iliaj financaj statoj ne estas tute bonaj. Ni kelkfoje ricevas helpon el sportemuloj.

E.A: Mi dankas vin pro via informo kaj esperas ke vi akceptos ion diri al ni kiam ni reinvitos vin.

H.V: Mi ankaŭ dankas vin.

*intervjuis: E.A: Esperanto en Afriko*

# VENONTAJ AGADOJ EN AFRIKO

## PROGRAMO DE LA SEMINARIO DE DKEA (DEMOKRATA KONGOLANDA ESPERANTO-ASOCIO) EN MBANZA NGUNGU

### Ĵaŭdo la 13-a de decembro 2007

- 18h00 Solena malfermo  
– Bonveniga vorto de loka organiza komitato (Ntoto Zola)  
– Vorto de la prezidanto de DKEA (Kiangani Loti)  
– Interkonatiĝa vespero
- 20h00 Laborkunsido de la instrua sekcio de DKEA

### Vendredo la 14-a de decembro 2007

- 8h00-12h30 Seminario  
Temo 1: Enkonduko al la kono de la Esperanto-movado (Ntoto Zola)  
Temo 2: La vivo de Zamenhof (Nsiangani Yuku)
- 14h00-18h00 Seminario  
Temo 3: Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia (Ngangu Nduantoni Bakidila)  
Temo 4: Kial dediĉi tiom da tempo kaj energio al la afero Esperanto? (Malanda)
- 21h00 Renkontiĝo de la mondcivitanoj

### Sabato la 15-a de decembro 2007

- 8h00-12h00 Seminario  
– Gramatikaĵoj el la kurso *Gerda malaperis* en Kongolando (Ntoto Zola kaj Nlandu Luyala)  
– Lingvaj ekzercoj el la kurso *Gerda malaperis* (Ntoto Zola kaj Nlandu Luyala)
- 15h00-17h30 Prelego al neesperantistoj kaj ekspozicio de esperantaĵoj (libroj, kartoj ktp)
- 18h00-19h30 Laborkunsido de la junulara sekcio DKEJO
- 20h00-22h00 Zamenhof-vespero

### Dimanĉo la 16-a de decembro 2007

- 8h00-12h00 Ĝenerala asembleo de DKEA
- 12h30 Komuna manĝo sekvata de disiĝo de la partoprenantoj

*por la loka organiza komitato, Aimé-Florent Ntoto Zola*

\*\*\*

## SEMINARIO EN RUMONGO, BURUNDO dum la Paska semajno en 2008

Jen informoj pri la onta seminario en Rumonge.

La seminario okazos en Rumonge, je 72 km de la ĉefurbo, en Preĝeja Hotelo (Bethel Hotel), kiu troviĝas apud la ŝiphaveno (kiu estas sur lago Tanganyika) kaj stacidomo de la 22-a ĝis la 29-a de marto 2008.

Ĝin partoprenos personoj el diversaj afrikaj landoj, kiuj nun sekvas la preparan kurson *Gerda malaperis*. La partoprenontoj devas kotizi po 3USD. Ĝin gvidos s-rino Margaretha Symoens el Belgujo. Por pli da informoj, kontaktu: Jérémie Sabiyumva, BP 170, Rumonge, Burundio; tel: (+257) 77 733052; retadreso: <jerrybs21@yahoo.fr>.

*Jérémie Sabiyumva*

\*\*\*

## ILEI-KONFERENCO EN PORTONOVO, BENINO

Dato de la aranĝo — de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2008 por ĝenerala programo kaj de la 5-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2008 por postkonferenca ekskurso.

Esperantistoj de ĉiuj landoj kaj de ĉiuj kontinentoj! – Vi estas invitataj partopreni la ILEI-konferencon por omaĝi kaj kuraĝigi la lokajn samideanojn, doni instigon al pliaj paŝoj kaj helpi disvastigi nian lingvon en la tuta mondo. La ILEI-konferenco en Afriko en la jaro 2008 estos grava evento kaj por la E-movado entute kaj por la historio de ILEI, same kiel por la Esperanto-movado en Afriko.

Konferenĉejo kaj tranoktejo: Songhai-centro, BP 597, Tel.: 229 20225092, Fakso: 229 20222050, Portonovo, Benino. Ĝi troviĝas en bone prizorgata granda park-aspekta tereno de agrikultura edukcentro proksime al la urbocentro.

Bonvolu skribi al: Aida Ĉizikaité <aidute@mail.lt>.



Simpatia kaj efika metodo de lernado: Emile Kabura, vic-prezidanto de ANEB, gvidas la klubon Espero en sia kvartalo. Membroj de la klubo estas familianoj kaj najbaroj. Vi vidas Emile starantan meze. Dua de maldekstre: Pamphile Bahata.



Estrarkunveno de DKEA je la 30-a de septembro 2007. De maldekstre: Dana Monshet (Lukala), ĝenerala sekretario; Simon Kiangani Loti (Kinŝaso), prezidanto; Innocent Lufiaulusu (Lufutoto), kasisto; Eddy Sava Babio (Matadio), konsilanto; Roger Mambuene (Mbanza Ngungu), kasisto de la Verda Flago; Aimé-Florent Ntoto Zola (Mbanza Ngungu), kunordiganto de la Afrika Komisiono; Evariste Munuku Wa Mulongo (Matadio); kaj Jérémie Ngoma Kikondolo (Lukala), vicprezidanto.

# LA KURSO *GERDA MALAPERIS* KAJ LA ALIAJ INSTRUILOJ UZATAJ DE LA AFRIKA OFICEJO DE UEA

La Afrika Oficejo de UEA sendas al petantoj la jenajn kursolibrojn:

- unuagrada en la franca: *Cours de langue internationale espéranto.*
- unuagrada en la angla: *The international language Esperanto: A Course.*
- duagrada en la franca: *Gerda malaperis kun klarigoj en la franca*
- duagrada en la angla: *Gerda malaperis kun klarigoj en la angla.*

Krome la Afrika Oficejo dissendas diskojn kun la prononco de *Gerda* al instruistoj.

Nuntempe sekvas la kurson *Gerda malaperis* proksimume 100 homoj en pluraj afrikaj landoj, ĉefe en la franclingvaj. Sekvado de la kurso kaj resendado de la ekzercoj al la instruisto estas esenca kondiĉo por partopreni la ILEI-konferencon en Portonovo, Benino venontan jaron.

Post la kurso *Gerda* la lernantoj devos legi du librojn, unu pri historio de Esperanto en Afriko kaj unu pri instrumentadoj.

Jen la libro pri historio, kiel ĝin prezentas la katalogo de la Libroservo de UEA:

<b>Afero de espero</b>		Heidi Goes <b>AFERO DE ESPERO</b> Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko  UEA
Titolo	Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko	
Aŭtoro	Heidi Goes	
Kategorio	Movado	
Prezo	9.00 €, triona rabato ekde 3 ekz.	
Eldonloko, jaro	Rotterdam, 2007	
Eldoninto	UEA	
Klarigoj	La unua provo de historio de la E-movado sur la nigra kontinento; kovras la periodon de la komenco ĝis la jaroj 1990.	
ISBN/ISSN	978929170969	
Formato	86 paĝoj, 21 cm	
Karakterizoj	Ilus	
Recenzoj	Recenzoj mankas. <a href="#">Aldonu</a>	

\*\*\*\*\*  
 Viajn komentojn, konsilojn, sugestojn kaj raportojn pri okazintaĵoj en via urbo aŭ lando bonvolu sendi al la redakteja adreso: [afrika.oficejo@co.uea.org](mailto:afrika.oficejo@co.uea.org) aŭ aerpoŝte al:

**Afrika Oficejo, BP. 416 Lokossa-Mono, Benin**  
**tel./fakso: +229 224 10 229**

\*\*\*\*\*